




VALENCIA LUNO

Tria epoko – numero 16 – Julio 2021

 **Ĉu vi povas trovi la erarojn?
Kiel korekti ilin? (2)**



ESPERANTO KAJ ASIMOV



BULTENO DE VALENCIA ESPERANTO-GRUPO

VALENCIA ESPERANTO-GRUPO

Av. Peris y Valero, 96, 3-a, pordo 5
46006 VALENCIA
Tel. 655 315 457

LUM-RADIO

Avda. Castilla, 25, 1-a, 1-a
46380 CHESTE (Valencia)

Redaktoro kaj kompostisto: Eduardo Alonso Navarro

Revizio: Elías Hernández Capdevila

Rimarkoj pri la bulteno kaj kunlaboroj: valencialuno3@gmail.com

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

ANTAŬAJ NUMEROJ

Vi povas elŝuti niajn antaŭajn numerojn ĉe nia retejo

<https://valencia.esperanto.es/ttt/publicacions/>

ENHAVO

- 
- 01 KOVRILO La verkisto de scienc-fikcio kaj biokemiisto Isaac Asimov
de Yousuf Karsh - Cordon Press
- 04 SALUTON! -
de Eduardo Alonso
- 05 ĈU IA AJN BONAĴO DUM LA PANDEMIO?
de Elías Hernández Capdevila
- 07 ESPERANTO KAJ ASIMOV
de Primrosejasmine
- 10 ANGULO DE LA ESPERANTISTA ŜAK-LUDANTO
de Elías Hernández Capdevila
- 13 HUMURO PER ESPERANTO (III)
de Elías Hernández Capdevila
- 15 ĈU VI POVAS TROVI LA ERAROJN?
KIEL KOREKTI ILIN?
Eraroj laŭ temoj de BEK-2
de Dennis Keefe
- 20 KIEL EVOLUIS NIA ESPERANTA MOVADO DUM LA PANDEMIO?
de Elías Hernández Capdevila
- 22 AL VENT - 50 ANYS
de Raimon - Tradukita de Santiago Cerveró

Foto: Isaac Asimov

SALUTON!

Karaj geamikoj:

Jen la nova numero de nia kara revuo. La kovrilo estas por **Isaac Asimov**, sciencfikcia verkisto kaj biokemiisto, fotita de Yousuf Karsh.

Ĉu ia ajn bonaĵo dum la pandemio? estas nova artikolo de Elías Hernández Capdevila. Poste ni vidos la rilaton inter **Esperanto kaj Asimov**, el la mano de Primrosejasmine.

Elías verkis ankaŭ la **Angulo de la esperantista ŝak-ludanto** kaj **Humuro per Esperanto**.

Ĉu vi povas trovi la erarojn? Kiel korekti ilin? estas ekzercoj, pri eraroj laŭ temoj de BEK-2, verkitaj de Dennis Keefe.

Poste, Elías rakontas al ni pri **kiel evoluis nia esperanta movado dum la pandemio**.

Kaj, por fini, ni memoros la kanton **Al vent**, de Raimon, tradukitan de Santiago Cerveró.

Bonan legadon.

Eduardo Alonso



ĈU IA AJN BONAĴO DUM LA PANDEMIO?

de Elías Hernández Capdevila

Jam pasis pli ol unu jaro ekde la komenco de la pandemio, kiam tiu murdema viruso nomita CORONAVIRUS -ni nomu ĝin Esperante "kronviruso"- ekatakis unuafoje en Ĉinio.

Ekde tiu momento, tiu aĉa estaĵo murdigis milionojn da homoj, ruinigis milojn da entreprenoj, senlaborigis nekalkuleblajn laboristojn kaj dispecigis sennombrajn familiojn. Nur tiuj kiuj suferis tion ĉion konas la veran vizaĝon de tiu viruso, kaj meritas nian admiron, kompaton kaj agnoskon.

Sed tamen tio ĉio, ĝi ankaŭ alportis kelkajn avantaĝojn, kvankam kompreneble tiuj avantaĝoj tute ne sufiĉas, kompare de la ege gravaj malavantaĝoj.

Por mi, la plej grava avantaĝo baziĝas je tio ke oni devis restadi hejme dum kelkaj monatoj, kaj tio ĉiam vekas en homo novajn ideojn, dezirojn, okupiĝojn, zorgojn, ...

Miakaze, mi reprenis malnovan lud-okupon, ŝakon, kaj mi rekomencis ludi tiun sciencan sporton ĉiu-tage inter-rete kontraŭ eksterlandaj ludantoj.

Sed certe tiu re-okupiĝo ne estas tro normala ĉe la plejmulto de homoj, kaj mi revenas al alia pli ofta aktivaĵo, LA LEGADO DE LIBROJ.

Dum ĉi-tiu deviga restado ĉe si mem, multaj homoj troviĝis tuje legante librojn po kelkaj horoj ĉiu-tage, dormetante dum kelkaj minutoj kaj denove reprenante la legadon je tiu sama alineo kie ili lasis la legadon pro subita dormemo. Miakaze, mi unue tralegis kaj poste trankvile legadis tri librojn, duon-forgesitajn dum multe da jaroj ĉe mia doma libraro:

- LA ARBO DE LA SCIADO, de Pío Baroja. Klasika hispana verkaĵo, facile legebla
- ANTAŬ DU MIL JAROJ, belega historia romano, pritemanta romian familion kiu vivis en la antikva Romo dum la unua jarcento

- LA HOBITO, de Tolkien, bela traduko de Wiliam Auld kaj aliaj en lingvon Esperanton. Temas pri amuza rakonto por plen-aĝuloj. Eĉ la aŭtoro, Tolkien, lernis nian mirindan lingvon sed, tute domaĝe, ne menciis ĝin je siaj verkoj.

Kaj jen miaj konsiloj pri legeblaj kaj legindaj, eĉ legendaj, libroj por ĉiu Esperantisto, dum la multnombraj horoj je kiuj ni ankoraŭ devus resti hejme:

- KARLO, klasika verko de Edmond Privat. Tiu verko estas la nuna legolibro uzata de nia kunulino Rosa dum sia ĉiu-marda kurseto en la Lernejo por Plenkreskuloj de Ĉeste

- LASU MIN PAROLI PLU, belega kaj simpla verko de Claude Piron. Tiu verko estis mia unua Esperanto libro, kiam mi esperantistiĝis jam antaŭ pli ol dekkvin jaroj

- LA ETA PRINCO, verkita de Saint-Exupéry. Tre facila kaj amuza verko, kiun ni uzis kiel babiligan ilon last-somere dum niaj renkontiĝoj per Zoom

Kompreneble, ne estas tro malfacile trovi en interreto ligilon al tiuj lastaj libroj. Se iu el vi deziras legi ilin, kaj ne trovas tiujn ligilojn, bonvolu kontakti min, kaj mi volonte informos vin pri ili kaj pri multe da aliaj similaj senpagaj verkaĵoj.

Elías Hernández Capdevila,
grupano 238 ĉe la Esperanto Grupo de Valencia



ESPERANTO KAJ ASIMOV

de Primrosejasmine (Primula Jasmeno)




Imaged by Heritage Auctions, HA.com

Esperanto estas lingvo, kiu ne apartenas al iu ajn lando aŭ homgrupo. Ĝi estis kreita de L. Zamenhof fine de 1800 por esti internacia lingvo, kiun homoj el la tuta mondo povas lerni kaj uzi por komuniki inter si. Ĝuste nun - 2/04/2011 je la 1:30 a.m. - Vikipedio havas 143 346 artikolojn verkitajn en Esperanto!


La ideo de Esperanto fascinas min, ĉefe pro la libroserio The Foundation (La Fundamento) de Isaac Asimov. Ĉi tiu serio okazas en malproksima estonteco, kiam landoj vivas sur malsamaj planedoj en malsamaj galaksioj. Ĝi temigas psikohistorianon nomatan Hari Seldon, kiu kombinas matematikon kaj sociajn teoriojn por formuli ekvaciojn kapablajn antaŭdiri la estontecon. Li uzas ĉi tiujn ekvaciojn por antaŭdiri la forpason de La Imperio, sekvata de longa periodo de tumulto, dum kiu la amasigita informo estos perdita. Por konservi sciojn kaj per tio mallongigi ĉi tiun periodon de malstabileco, li komencas organizon de homoj (La Fundamento) por kolekti kaj enmeti ĉion en la Enciklopedion Galaktikan.

Jen mirinda ideo! Povi iri al unu loko kaj serĉi ĉiujn informojn, kiujn vi eble iam bezonos, estas kiel havi la riveron de vivo ĉe viaj fingropintoj! Estas unu problemo. Por ke ĉi tio funkciu, ĉiuj socioj devas havi komunan, universalan lingvon, kiu neniam ŝanĝiĝas, kaj kiun ĉiuj konas. Lingvoj nature evoluas laŭ la tempoj, kio klarigas kial mi ne povas kompreni la plej grandan parton de tio, kion Ŝekspiro skribas. Tamen gravas, ke *ĉi tiu lingvo* neniam ŝanĝiĝos tiel ke homoj naskiĝintaj jarcentojn kaj jarmilojn aparte ankoraŭ povas kompreni tion, kio estas enhavita en la Enciklopedio Galaktika.



Esperanto sonas tiucele kiel promesplena lingvo. Bonŝance kaj bedaŭrinde ĝi ne estas statika. Ni donu al Esperanto pli da tempo por evolui; 125 * jaroj estas ankoraŭ tre juna en lingva epoko. Iam en la estonteco ni povas dokumenti ĉiujn elementojn de ĉi tiu lingvo kaj diri: "Ĉi tie haltas la evoluado." Tio estas unu maniero fari la Enciklopedion Galaktikan alirebla por ĉiuj generacioj.

* *Ĉi tio estis origine verkita kiel 115 jaroj, sed oni atentigis, ke mia matematiko estis malĝusta.*



KOMENTO:

Bill Chapman *diris:*

Mi esperas, ke vi permesos al mi unu etan korektadon en la epoko de Esperanto. Ĝiaj parolantoj festos la 125-an jarmilon de Esperantyo en la venonta jaro. Esperanto ankoraŭ ne akiris la meritan rekonon. Tamen, ĉio konsiderita, ĝi efektive mirinde bone sukcesis.

En preskaŭ 125 jaroj, ĝi sukcesis kreski de desegnaprojekto kun nur unu parolanto en unu lando al kompleta kaj viva natura lingvo kun ĉirkaŭ 2 000 000 parolantoj en pli ol 120 landoj kaj riĉa literaturo kaj kosmopolita kulturo, kun malmulta aŭ neniu. oficiala subteno kaj eĉ atakoj de persekutado. Ĝi ne kaptis la mondon - ankoraŭ - sed ĝi malrapide sed certe moviĝas en tiu direkto, kaj la interreto donis al ĝi signifan akcelon en la lastaj jaroj.

Fonto:

<https://primrosejasmine.wordpress.com/2011/04/02/esperanto-and-asimov/>


ANGULO DE LA ESPERANTISTA ŜAK-LUDANTO

de Elías Hernández Capdevila

Kaj jen la ĉiu-monata artikolo pri du facilaj ŝak-matoj, atingitaj per nur unu movo de blanka peco. Tiu ŝak-mato povus esti atingita per iu ajn peco, do, per **damo**, **turo**, **kuriero**, **ĉevalo** aŭ **peono**. Kompreneble, mi montras ankaŭ la solvon ĉe ĉiu ŝak-mato. Bonvolu provi ne rigardi la solvon ĝis post du da minutetoj.

Por faciligi al vi tiun taskon, mi ripetas necesan klarigon, pri la ĉefaj menciindaj ideoj pri tiu mirinda sporto-scienco:

La ŝak-tabulo aspektas tiel, kun pecoj (maldekstre) kaj sen ili, tute malplena:



Jen la diversaj pecoj. La pecoj moviĝas kaj samtempe ekkaptas tiel:

- **reĝo**: po unu ĉelo ĉiu-foje, en libervola direkto (vertikale, horizontale aŭ diagonale, kaj antaŭen kaj malantaŭen). Angle KING, france ROI, valencie REI kaj hispane REY.
- **turo**: laŭlonge de vicoj kaj kolumnoj (ĉe ŝak-lukto ĉiu kolono nomiĝas kolumno). Komence, estas du turoj por ĉiu ludanto sur la ŝak-tabulo. Angle ROOK, france TOUR, valencie TORRE kaj hispane TORRE.



- **kuriero**: laŭlonge de la diagonaloj. Estas ankaŭ du kurieroj sur la ŝak-tabulo por ĉiu ludanto, unu moviĝanta sur blankaj ĉeloj, la alia sur nigraj ĉeloj. Angle BISHOP, france FOU, valencie ALFIL kaj hispane ALFIL.
- **damo**: laŭlonge de vicoj, kolumnoj kaj diagonaloj. Oni povas diri ke tiu peco kapablas agi kiel turo kaj kiel kuriero, samtempe. Sed atentu: la damo ne povas agi kiel la ĉevalo ... do, ne forgesu ĉi-tiun ne-kapablon ... Angle QUEEN, france DAME, valencie DAMA kaj hispane DAMA.
- **ĉevalo**: per saltoj laŭ la litero L (du ĉeloj rekten kaj unu flanken, aŭ unu ĉelo rekten kaj du flanken). Ĝi povas transalti kaj siajn proprajn pecojn kaj la pecojn de la alia ludanto. Ĝi estas eble la plej ŝatata peco kiu staras sur la tabulo, ĉar oni povas duoblo-ataki aliajn kontraŭajn pecojn pli facile ol per kuriero, turo, damo, peono aŭ eĉ la reĝo ... Komence estas du ĉevaloj sur la ŝak-tabulo por ĉiu ludanto. Angle KNIGHT, france CAVALIER, valencie CAVALL kaj hispane CABALLO.
- **peono**: je unu ĉelo antaŭen, neniam mal-antaŭen, se tiu ĉi ĉelo estas vaka aŭ malplena (se la peono estas ankoraŭ en la baza pozicio, ĝi povas transmoviĝi je du ĉeloj antaŭen, se ambaŭ ĉeloj estas vakaj aŭ malplenaj). Plie ĝi povas preni aŭ ekkapti pecon de la alia ludanto, kiu estas sur diagonale najbara ĉelo staranta antaŭ la peono. Komence estas ok peonoj por ĉiu ludanto. Angle PAWN, france PION, valencie PEÓ kaj hispane PEÓN.

La ŜAK-LUDO estas rigardata kaj konsiderata de la UNESKO kiel SCIENCO kaj SPORTO, samtempe, kaj tiu Institucio rekomendas vigle ties uzadon kaj diskonigon per mez-lernejoj en la tuta mondo.

Kaj jen niaj du ĉi-monataj ŝak-matoj (rememoru: oni povas atingi ĉiun ŝakmaton per nur unu movo de blanka peco). Kvankam eble vi ne konvinkiĝos, ludi ŝak-ludon, aŭ almenaŭ provi solvi malgrandajn problemetojn, kiel tiujn kiujn mi montras al vi, estas eksterordinara ekzerco por via menso kaj por via kapablo koncentriĝi:

Havu kuraĝon, kaj provu solvi la du problemetojn!



SOLVO: la blanka turo grimpas ĝis la plej supra parto de la tabulo, kaj tie ĝi matigas la kompatindan nigran reĝon, kiu subite mortas. La nigra turo ne povas haltigi tiun mortigon, ĉar la blanka damo matigus la reĝon.



SOLVO: la blanka ĉevalo saltas du ĉelojn dekstren kaj unu ĉelon supren, matigante la nigran reĝon. La reĝo ne povas foriri maldekstren pro la atako de la blanka kuriero, kaj la nigra peono ne povas ek-kapti la blankan ĉevalon pro la atako de la blanka turo kiu troviĝas en la dekstra kolono.

Elías Hernández Capdevila

HUMURO PER ESPERANTO (III)

de Elías Hernández Capdevila

**PATRINO, MI MULTE
MALTRANKVILIĜAS,
ĈAR MIA EDZO IRIS
HIERAŬ AĈETI KILON
DA RIZO, SED LI
ANKORAŬ NE
REVENIS ... KION NI
FAROS, MI KAJ MIAJ
GEFILOJ?**



**NE PANIKU, FILINO MIA. ĴUS KUIRU SPAGETOJN.
VIAJ GEFILOJ MULTE ŜATAS TIUN KUIRAĴON ...**

**KARULO, KIE VI LASIS
ĈI-MATENE NIAN
BEBETON?. MI NE
POVAS TROVI LIN ...**

**BONVOLU ATENDI ĜIS
TIAM KIAM LI PLOROS**

**KIAL MI DEVAS ATENDI ĜIS
TIAM KIAM LI PLOROS?.
KLARIGU TION AL MI ...**



**TIEL ONI SCIOS
KIE LI TROVIĜAS.
MI TUTE
FORGESIS KIE MI
LASIS LIN ...**



Elías Hernández Capdevila

ĈU VI POVAS TROVI LA ERAROJN? KIEL KOREKTI ILIN? (2)

Eraroj laŭ temoj de BEK-2 de Dennis Keefe

En la lasta numero de la Valencia Luno, mi prezentis ekzercon en kiu troviĝas eraroj korektotaj de vi. Nun en ĉi tiu numero mi verkis duan eraro-korektan ekzercon, kiu ĉi foje baziĝas ne sur la enhavo de BEK-1, sed sur tiu de BEK-2 (www.bekurso.info).

En BEK-2 estas 28 paĝoj, kun ĉirkaŭ 28 gramatikaj temoj, do en la suba ekzerco vi trovos 28 ekzercojn kiuj rekte rilatas ĉiujn el tiuj temoj. Via tasko, kiel antaŭe, estas trovi la eraron aŭ la erarojn kaj korekti ĝin aŭ ilin. Ne ĉiam estas nur unu eraro, kaj kelkfoje estas pluraj manieroj korekti la eraron. Ĉe la fino de la ekzerco troviĝas solvoj – tamen ne ĉiuj eblaj – de la ekzercoj. Ankaŭ aldoniĝas koncizaj klarigoj de la eraroj. Bonan ŝanĉon. Bonan lernadon.

Pro tio, ke Esperanto havas klarajn regulojn, kaj tiuj reguloj estas senesceptaj, la korektado de eraroj helpas al vi plibonigi vian Esperanton sufiĉe bone kaj relative rapide. Tiel ne okazas en aliaj lingvoj. Eraro-korektado en la angla, ekzemple, povas pli konfuzi vin ol helpi vin, ĉar ne klaras en la angla ĝuste kiam iu subregulo, aŭ iu subsubregulo aplikaĝas.

Feliĉe, la korektado de Esperanto-eraroj estas multe pli simpla, kaj multe pli helpas, laŭ mi, en la lingvo-lernado. Nun, ek al la korektado!

1. Kiaj estas la arboj, kiu staras malantaŭ la domo?
2. Ĉu la panoj, kiuj Paŭlo bakis, estas longaj aŭ mallongaj?
3. La arbo, kiu Marko hakas, estas alta.
4. Ĉu la virino, kiun iros al Romo, nomiĝas Ana?

5. Kies ŝuoj estas nigraj? -- Paŭlo surhavas nigraj ŝuoj.
6. Kiam komenciĝas ilia leciono de Esperanto? -- Tiom (li montras per fingro la komenco-horon skribita sur papero). Je la sepa kaj duono vespere.
7. Tiu lando, kiun la instruisto montras, estas Usono, kaj tiu, kiu la instruistino montras, estas Italio.
8. Ĉu tiu libro estas ŝia? -- Ne, ne tiu. La libro estas de la profesoro.
9. Ĉu estas io sur la tablo en la ĉambro? -- Ne, ne estas nenio tie.
10. Ĉu iu sidas sur la seĝo en la ĉambro? -- Jes, io. Sed mi ne scias, kiu sidas tie.
11. Ĉu vi ĉeestos la esperantan prelegon morgaŭ?
-- Eble. Tio dependas. Mi jam ne scias. Mi kontrolos mian horaron por morgaŭ.
12. Kiel kutime, Pablo brosas liajn dentojn post la matenmanĝo.
13. En la kuirejo, Paŭlo akcidente tranĉis sian fingron. Sia fingro multe sangis.
14. Kun kio oni skribas retajn mesaĝojn? Skribilo? Komputilo? Poŝtelefono?
15. Li estas multe pli alta ke Sinjoro Nopo,
16. Mi havas tiom da moneroj kiel vi. Dek por mi, kaj dek por vi.
16 a) Ramono estas la pli alta el la tuta familio. Ĉiuj estas pli malaltaj ol li.
16 b) Ili estas pli alta ol vi.
17. Se mi estus la prezidento de Francio, mi malplialtigos la impostojn!
17 a) Maria sendis sian filon al la panvendejo, por ke li aĉeti du panojn kaj unu kukon.
18. Jes al mi ŝatas multe naĝi en la maro, kaj tendumi en la montaro.
19. Paŭlo kaj Maria iras al la panvendejoj ĉiunmatene antaŭ la laboro.
20. La Someraj Olimpikaj Ludoj kutime okazas unu foje en ĉiuj kvar jaroj.
21. Kion ni devas faras por bone paroli kaj skribi Esperanton?
22. Nun estas neniom vino en la botelo, ĉar la ebrulo trinkis la tuton.
23. Kie troviĝas hotelo, kie dormas bone kaj malmultekoste?

24. Ĉu vi povus diri al mi, proksime kiu strato loĝas viaj gepatroj kaj via fratino?

25. En septembron la infanoj de multaj landoj rekomencas lerni en la lernejoj.

26. Lia vekhorloĝo sonoris je la sepa. Antaŭ tio li haltigis la sonorilon de la vekhorloĝo.

27. Kiel nomiĝas la persono, kun kiuj Mipi parolas nun?

28. Por fari kion vi alvenis al nian kurson hodiaŭ?

Respondoj:

1) kiuj (ĉar estas pli ol unu arbo)

2) kiujn (ĉar ĝi estas la rekta objekto de bakas en la subfrazo)

3) kiun (ĉar ĝi estas la rekta objekto de hakas)

4) kiu (ĉar ĝi estas la subjekto de iras)

5) nigrajn ŝuojn (ĉar nigrajn ŝuon estas la rekta objekto de surhavas)

6) tiam (ĉar tiom estas por kvanto, kaj tiam estas por tempo)

7) tiu, kiun (ĉar ĝi estas la rekta objekto de montras)

8) ties (ĉar ties rilatas posedon, ankaŭ eblas diri de tiu, sed ne tiu sen alia vorto)

9) Ne, ne estas io tie, aŭ Ne, estas nenio tie (ĉar en Esperanto, en normala uzo, oni ne uzas duoblajn negativajn frazojn)

10) Jes, iu (ĉar oni ne parolas pri objektoj, sed pri homoj, homoj kiuj sidas)

11) Mi ankoraŭ ne scias (pristudu la rilaton inter jam kaj ankoraŭ. Lernu uzi tiujn du vortojn bone.)

12) siajn dentojn (kvankam liajn eblas gramatike, tio estus stranga situacio, ĉar kutime oni ne brosas la dentojn de alia homo)

13) Lia fingro (ĉar subjekto neniam uzas la subjektajn si-formojn: si, sia, siaj)

14) Per kio (ĉar estas instrumento, ne estas akompano)

15) alta ol (ĉar ni diras "pli ol, malpli ol" – "ke" estas konjunkcio por frazoj kiel: Mi pensas, ke . . . Mi opinias, ke . . . kaj ankaŭ frazoj similaj al . . . la fakto, ke. Neniom diru: *La libro ke li aĉetis – sed diru: la libro kiun li aĉetis . . .)

16) kiom vi (ĉar estas tiom kiom, tiel kiel, tia kia, tiu kiu, ktp)

16a) la plej alta (ĉar estas pluraj homoj en la familio, ne du)

16b) altaj (ĉar la subjekto ili estas pluralo, do + j. Komparu: Vi estas malpli alta ol ili, do ili estas pli altaj ol vi.)

17) malplialtigus (ĉar nereala situacio, vi NE estas la prezidento de Francio, do us-formo)

17a) por ke li aĉetu (ĉar post por + ke = + u. Alivorte se en la subfrazo estas la sama subjekto, oni uzas por + i, kaj se en la subfrazo estas malsama subjekto, oni aldonas: por ke + u). Bonvolu bone lernu la diferencon inter tiuj du frazo-specoj.

18) al mi plaĉas, aŭ, mi ŝatas (revidu la diferencon en BEK-1 pri la gramatika malsameco inter plaĉi kaj ŝati. La signifo estas ofte la sama, sed la formo ne.)

19) ĉiumatene (unuverte, rigardu bone ne estas *ĉiuNmatene) aŭ ĉiun matenon (apartaj vortoj, kaj pri tempo-mezurado) aŭ en ĉiu mateno (kun prepozicio, do sen akuzativo). Memoru, ĉar estas kiel en la sekvaj variaĵoj: lunde, lundon, en lundo (adverbo = rekta objekto = prepozicia frazo)

20) unufoje aŭ unu fojon aŭ en unu fojo (teorie ĉiam estas tri formoj, kelkaj aŭtoroj vidas nuancojn inter la tri formoj, mi ne tiom, almenaŭ ne en ĉiutaga, parola lingvo-uzo)

21) devas fari (ĉar du sinsekvaj verboj, la unu havas is/as/os/us/u kaj malofte -i, dum la dua estas infinitivo -i. Revidu tion en BEK-1).

22) neniom da (Komparu: Estas neniom. Estas neniom da tio, neniom da akvo, ktp)

23) kie oni dormas (ĉar estas preferinde, ke subjekto estu ankaŭ en la subfrazon ĉi tie)

24) proksime de kiu strato (ĉar proksime estas adverbo ne prepozicio, simile kiel dekstre de la tablo, norde de Parizo)

25) En septembro (ĉar la prepozicio EN forigas la akuzativon en tempo kaj aliaj mezuraj frazoj. Komparu, tamen, La knabo saltis en la riveron. Riveron, ĉar ĉi tie estas kazo de almovo – unue la knabo estis apud la rivero, ne en, kaj poste li estis EN la akvo, ne apude)

26) Post tio (ĉar diri antaŭ estas ne-logike ĉi tie. Unue sonoras, poste haltigas – ne inverse. Eraro de logiko, ne de gramatiko)

27) kun kiu (ĉar estas nur unu persono, ne du)

28) al nia kurso (ĉar kvankam estas almovo, la prepozicioj AL kaj ĜIS forprenas la mezuro-akuzativon).

Fino.

Dennis Keefe
Valencia Esperanto-Grupo
Majo, 2021



KIEL EVOLUIS NIA ESPERANTA MOVADO DUM LA PANDEMIO?

de Elías Hernández Capdevila

En alia artikolo por ĉi-sama eldono de Valencia Luno, mi jam opiniis pri bonaj libroj legindaj dum la pandemio. Nun mi volus paroli pri kiaj eventoj –rilate de Esperanto, kompreneble- ni okazigis en nia provinco dum tiu forgesenda kaj forgesinda malbona tempo.

Mi komencos mian klarigadon per aludo al nia frateca grupo de Ĉeste, LUMRADIO, unu el la plej aktivaj esperantistaroj kiun oni povas ekkoni. Tie, Pepe Manzanera kaj Rosa Zanón laboras senriproze por teni vivanta tiun fajron jam bruligita de Francisco Máñez je la komenco de la XX^a jarcento.

Antaŭ la pandemio, Rosa jam estis instruanta kurseton por lokaj komencantoj je la LERNEJO por PLEN-AĜULOJ de Ĉeste, pere de taŭga permeso kaj sufiĉa monhela subvencio de la ĉestana urbodomo, precipe danke al apogo de María Ángeles, urbestrarino pri Kulturo kaj Publika Edukado.

Post kelkaj monatoj sen ebleco daŭrigi tiun kurseton, pro evidentaj kialoj, la urbodomo denove permesis la okazigon de tiu evento, kaj ĝis la pasinta monato de Junio nia kunulino Rosa kapablis instrui nian lingvon al tiuj partoprenantoj kiuj decidis daŭrigi la kurseton: Salvador, María Ángeles, Angelita, Pepe, María Luisa, José Luis, ...

Rosa Zanón estas nun la plej grava instruistino je tiu Lernejo, kaj oni povas diri ke ŝi estas vivanta garantiaĵo por daŭrigi la flamon pri Esperanto en Ĉeste, kiu jam estus estingita sen ŝia sin-dediĉo. Pro tio, la monda anoncilo Eventa Servo ekdonis al Ĉeste la unuan MAPON PRI ESPERANTO sur la hispana surfaco, kion oni povas pruvi je ĉi-tiu ligilo: <https://eventaservo.org/e/2ba566>. Nur Ĉeste aperas sur la tuta hispana mapo.

Dum la lasta monato, Rosa invitis kelkajn nelokajn Esperantistojn –inter kiuj ŝi inkludis min- por instrui la lingvon pere de la Zoom sistemo. Mi ege dankas al Rosa pro tia ebleco instrui tiajn dediĉemajn kaj lernemajn gelernantojn.

Ankaŭ dum ĉi-tiu pandemio, ĉiu-marde posttagmeze, nia grupo okazigis kurseton por komencantoj, ankaŭ pere de la sistemo Zoom, organizata de Eduardo, kaj instruita de Dennis, Raúl kaj Eduardo (kiu estis kaj organizanto kaj instruanto, samtempe)

Tiu kurseto estas gravega evento ĉe nia movado, ĉar kelkaj gelernantoj jam atingis sufiĉe da kono pri nia lingvo, kaj ŝajnas ke ili daŭrigos sian lernadon post la fino de la kurseto. Inter la gelernantoj, oni devus laŭdi la ĉiu-semajnan ĉeeston de Anĥelo, Antonio, Arnjo, Avelinda, Begoña, Laryssa, Luis, Santiago, ...

Dum la posttagmezo de ĉiuj vendredoj, dum la pandemio, oni ankaŭ okazigis longan sed amuzan renkontiĝon ankaŭ organizatan de Eduardo, ekde la kvara horo ĝis la sepa horo. Dum tiuj tri horoj ni kunvenis tri foje, post ripoz-paŭzoj de 10 minutoj, por partopreni je KURSETO PRI VORTOJ (ekde la kvara horo, kurs-gvidata de Dennis, kaj kreita de li pere de la internacia BILD-VORTARO), KOMENTO KAJ DEMANDARO pri Don Kiĥote (ekde la kvina horo, ankaŭ gvidata de Dennis kaj ĉeestata de multe da eksterlandanoj el kelkaj landoj, kiel Francio, Rusio, Germanio, Anglio, Polando, ...) kaj LOKA INTER-BABILADO (ekde la sesa horo, foje inkludante konkurseton kreitan de mi, SCII KAJ GAJNI, tre simile de fama evento ĉe nacia televido).

Dum la monato Junio la dua evento (KOMENTO KAJ DEMANDARO PRI DON KIĤOTE) estis anstataŭita de KURSO PRI ASTRONOMIO, kreita de la tutmonde konata hebrea profesoro Amri Wandel kaj kurs-gvidata ankaŭ de Dennis. Ankaŭ tiuj tri eventoj estis anoncataj ĉe Eventa Servo, kio helpis, kompreneble, diskonigi ilin inter eksterlandanoj ...

Do, oni ne povas diri ke la valencia Esperantistaro tro ripozis aŭ ne sufiĉe laboris por Esperanto dum tiuj longegaj monatoj, sed oni devus aserti tute kontraŭe. Por mi, la plej grava afero estis pruvi (denove) ke Esperanto estas vivanta lingvo kiun oni povas uzi kiel veran internacian komunikilon. Dum la pandemio mi konatiĝis al homoj el aliaj landoj (Dieter el Svislando, Laryssa el Ukrainio sed loĝanta en Francio, Jean Paul el Germanio, ..., kaj multaj aliaj) kiujn mi ne povus ekkoni sen Esperanto.

Elías Hernández Capdevila,

grupano 238 ĉe la Esperanto Grupo de Valencia

AL VENT - 50 ANYS

de Raimon – Tradukita de Santiago Cerveró

Al vent'

Vizaĝ' al vent'

La kor' al vent'

Manoj al vent'

Okuloj al vent'

Al vent' de l' mond'

Kaj ni

Plenaj de nokt'

Serĉantoj de lum'

Serĉantoj de pac'

Serĉantoj de Di'

Al vent' de l' mond'

La vivo donas penojn

Ja Naskiĝi estas plendeg'

La vivo: jen tiu plend'

Sed ni ĉiuj

Al vent'

Vizaĝ' al vent'

La koro al vent'

Manoj al vent'

Okuloj al vent'

Al vent' de l' mond'

Kaj ni

Plenaj de nokt'

Serĉantoj de lum'

Serĉantoj de pac'

Serĉantoj de Di'

Al vent' de l' mond'

Serĉantoj de Di'

Al vent' de l' mond'